

## 29 HISTORIETO PRI KASROMPULO KAJ BRULIGINTO

„Koncerne tion," diris sinjoro Jílek, „ŝteli oni devas scii. Tion ankaŭ diradis sinjoro Balabán, tiu kasrompulo, kiu lastfoje elŝtelis kason ĉe firmao Scholle kaj komp. Tiu Balabán estis tia klera kaj prudenta rabisto; krome li estis pli aĝa, kaj memkomprene, tiujn spertojn ne ĉiu havas. Juna homo pli preferas hazardi; kun la kuraĝo kelkio sukcesas, sed kiam oni komencas pripensi, oni kutime perdas kuraĝon kaj tial oni alpaŝas al la afero kun prudento. Tio validas en politiko kaj en ĉio.

Tiu Balabán diradis do, ke ĉiu laboro havas sian regulon; kaj kio koncernas la romp-rezistajn kasojn, kasrompulo laboru ĉiam sola, ĉar li darfis neniun fidi; due, neniam li laboru longe en unu loko, ĉar tiukaze oni konas lian laboron; trie, li sekvu la progreson kaj ellernu ĉion, kio nova estas en lia fako; sed dume li sekvu tradicion kaj bonan mezon, ĉar ju pli da homoj sammaniere laboras, des pli malfacile por la polico. Tial Balabán restis ĉe dirko, kvankam li havis elektran borilon kaj sciis ankaŭ manipuli kun oksigena flamo. Li diris, ke ĝi estas superflua vanto, aŭ ambicio ekrompi la modernajn kirasajn sefojn; li laboras prefere ĉe la malnovaj kaj solidaj firmaoj, havantaj malnovajn ŝtalkasojn kaj en ili honestan monon kaj ne ĉekojn. Li havis ĉion bone pripensita kaj decidita, tiu Balabán. Krome li komercis kun ruba latuno, peris proprietaĵojn, negocis pri ĉevaloj kaj entute sufiĉe li bonstatis.

Tiu Balabán do diris, ke li elrompos jam nur unu kason, sed ke tio estos neta laboro, ke la juna generacio okulegos. Nome, la ĉefa afero ne estas akiri grandan sumon; la ĉefa estas, diradis Balabán, ne lasi sin kapti.

La lasta kaso, kiun tiu Balabán elŝtelis, estis ĉe firmao Scholle kaj komp., sciu, tio estas fabriko en Bubny. Tio, kion li tie faris, estis vere neta laboro; rakontis tion al mi iu polica agento, iu Piŝtora.

## 29 PŘÍBĚH O KASAŘI A ŽHÁŘI

„Copak o to," pravil pan Jílek, „krást se musí umět. To říkával taky pan Balabán, ten kasař, co naposledy udělal tu kasu u firmy Scholle a spol. Ten Balabán, to byl takový vzdělaný a rozšafný lupič; taky už byl starší, a to dá rozum, ty zkušenosti každý nemá. Mladý člověk má spíš takový hazard; ono se s kuráží ledacos podaří, ale když člověk začne přemýšlet, tak obyčejně ztrácí tu kuráž, a proto jde na věc s rozvahou. To platí v politice a ve všem.

Tak ten Balabán říkal, že každá práce má své pravidlo; a co se týče nedobytných pokladen, že takový kasař má vždycky pracovat sám, protože se nemá na nikoho spoléhat; za druhé, že nemá nikdy pracovat dlouho na jednom místě, protože pak už jeho práci znají; za třetí, že má jít s duchem doby a naučit se všemu, co je v jeho oboru nového; ale přitom se má držet takové té tradice a dobrého průměru, protože čím víc lidí tím způsobem pracuje, tím to má policie těžší. Proto se ten Balabán držel hasáku, třebaže měl elektrickou vrtačku a uměl zacházet i s tím termitem.

On říkal, že to je taková zbytečná ješitnost nebo ctižádost, pouštět se do těch moderních pancéřových sejfů; on že raději pracuje u takových starých a solidních firem, které mají staré ocelové kasy a v nich poctivé peníze, a ne tyhle šeky. To on to měl všecko dobře rozváženo a zpečetěno, ten Balabán. On měl kromě toho obchod se starou mosazí, dohazoval reality, kšeftoval v koních a vůbec stál si dost dobře.

Teda ten Balabán říkal, že udělá už jenom jednu kasu, ale to že bude čistá práce, to prý bude ta mladá generace mrkat. Ono prý není hlavní věc udělat velké peníze; hlavní je, říkal ten Balabán, nedat se chytit. Tedy ta poslední kasa, co si ten Balabán vybral, byla u firmy Scholle a spol., víte, co je ta továrna v Bubnech. Ale to vám byla opravdu čistá práce, co tam udělal; mně to vypravoval jeden agent od policie, nějaký Pištora.

Li penetris tien tra fenestro el korto, same kiel nia doktoro Vitásek, sed li devis elrompi kradaron; ĝojo rigardi, diris tiu Pištora, kiel nete li forigis kradaron; eĉ nenian malpuraĵon li postlasis, tiel bele tiu homo laboris. Kaj sur tiu loko, kie li komencis, tie li la kason ankaŭ malfermis; tie estis eĉ ne unu superflua truo aŭ sulketo, nek grato aŭ skrapo, eĉ farbotegon sur la kaso li ne forskrapis sennecese. Videblis, diris tiu Pištora, kun kia amo tiu homo tion faris. La kaso estas ja en la polica muzeo, pro la majstra laboro. Poste li elprenis la monon, ĉirkaŭ sesdek mil, formanĝis pecon da lardo kaj pano, kiujn li kunprenis, kaj denove li foriris tra la fenestro; tiu Balabán diris, ke armeestro devas ĉefe zorgi pri retreto. Poste li alportis la monon al sia kuzino; la instrumentojn li kaŝis ĉe iu Lizner, iris hejmen, purigis siajn vestojn kaj ŝuojn, lavis sin kaj enlitiĝis kiel ĉiu ordema homo. Ankoraŭ ne estis la oka matene, kiam iu frapas sur pordon kaj vokas: Sinjoro Balabán, malfermu! Tiu Balabán miras, kiu li povas esti, sed iras kun trankvila konscienco malfermi; kaj en la pordon puŝas sin du policistoj kaj kun ili tiu agento Pištora.

Mi ne scias, ĉu vi konas lin - li estas malgrandeta homo kaj havas dentojn kiel sciuro kaj senĉese li ridas. Iam li estis ĉe funebristoj, sed perdis la okupon, ĉar ĉiuj homoj devis ridi, kiam li plandis tiel antaŭ la ĉerko kaj senĉese tiel ridinde rikanis. Mi rimarkis, ke multaj homoj rikanas nur pro ia embaraso, ĉar ili ne scias, kion fari kun la buŝo, aliaj same ne scias, kion fari kun la manoj. Tial la homoj tiom fervore ridetas, kiam ili parolas kun iu granda sinjoro, ekzemple kun regnestro aŭ kun prezidento; ne tiom pro ĝojo kiom pro embaraso.

Sed mi volas paroli pri tiu Balabán. Kiam tiu Balabán vidis la du policistojn kun Pištora, li abruptis ilin en justa kolero: Kion vi ŝerĉaŝ ĉe mi? Kun vi mi volaŝ nenion havi. - Ĉe tio li mem embarasiĝis pro tio, kiel li lispas. Haha, sinjoro Balabán, ridis tiu Pištora, ni iras ja rigardi nur viajn dentojn. - Kaj tuj li iris al ia kolorita poteto, en kiun Balabán metadis por nokto sian dentaron, nome li perdis plejparton de siaj dentoj, kiam foje li devis salti el fenestro.

On tam vlezl oknem ze dvora, tak jako tuhle pan doktor Vitásek, ale musel vypáčit mříže; to vám byla radost se podívat, říkal ten Pištora, jak čistě tu mříž vyndal, ani žádné svinstvo nenadělal, tak krásně ten člověk pracoval. A na tom místě, kde tu kasu načal, ji taky otevřel; nebyla tam ani jedna zbytečná díra nebo rejha, ani škráb nebo rejpanec, ba ani nátěr na té kase zbytečně neodřel. To bylo vidět, říkal ten Pištora, s jakou láskou to ten člověk dělal. Však ta kasa je teď v policejním muzeu, kvůli té mistrovské práci. Potom vybral peníze, asi šedesát tisíc, snědl kus špeku a chleba, co s sebou přinesl, a zas odešel oknem; on ten Balabán říkal, že vojevůdce a kasař se musí starat hlavně o ústup. Potom donesl ty peníze k své sestřenici, nástroje schoval u nějakého Liznera, šel domů, vyčistil si šaty a boty, umyl se a vlezl do postele jako každý pořádný člověk. Ono vám ještě nebylo osm hodin ráno, když někdo tluče na dveře a volá: Pane Balabán, otevřte! Ten Balabán se diví, kdopak to může být, ale jde s klidným svědomím otevřít; a do dveří se hrnou dva policajti a s nimi ten agent Pištora. Já nevím, znáte-li ho, – on je takový pomešší člověk a má zuby jako veverka a pořád se směje. On býval dřív u funebráků, ale přišel z chleba, protože se všichni lidé museli smát, když tak šlapal před tou rakví a pořád se tak špásovně zubil. Já jsem pozoroval, že mnoho lidí se šklebí jenom z takových rozpaků, že nevědí, co by dělali s hubou, jako jiní nevědí, co by dělali s rukama. Proto se lidé tak horlivě usmívají, když mluví s nějakým velikým Pánem, příkladně s panovníkem nebo s prezidentem; ono to není ani tak z radosti jako spíš z takových rozpaků. Ale já jsem chtěl mluvit o tom Balabánovi. Když ten Balabán viděl ty dva strážníky s Pištorem, spustil na ně se spravedlivým hněvem: Čopak mně šem ležete? Já š vámi nechci nič mít. – Přitom se sám zarazil nad tím, jak šišlá. Ale pane Balabán, smál se ten Pištora, dyť my se vám jdeme jenom podívat na zuby. – A rovnou šel k takovému malovanému hrníčku, do kterého si ten Balabán dával na noc chrup, – on totiž přišel o většinu zubů, když jednou musel skočit z okna.

Nu jes, sinjoro Balabán, diras plezure Pištora, ili ne tenas, ĉi - falsaj dentoj; ili, la dentoj, moviĝis al vi dum laborado kaj tial vi eligis ilin kaj metis sur skribotablon; jes, sed tie estis ege da polvo, - sinjoro Balabán, vi povus jam scii, kiom da polvo estas en la kontoro. Tiam ni devas iri al vi, sinjoro Balabán, kiam ni trovas tian spuron post la dentoj; ne koleru do je ni. Sed unue vi devus viŝi la polvon.

Malŝaĝa afero, miris Balabán. Vidu, Pištora, oni diras, ke unu eraron faras eĉ la plej ŝaĝa friponego, nu ne? Sed vi faris du, rikanis sinjoro Pištora. Hometo, nur ni enrigardis tien, kaj ni divenis vin, kaj ĉu vi scias, kial? Ĉiu brava rabisto surloke, pardonu, elumas, por ke oni ne kaptu lin: tio estas tia superstiĉo. Nur vi estas nekredanto kaj rezonulo, kaj malatentas la superstiĉojn; vi opinias, ke por ĉio sufiĉas la racio. Jen vi havas. Jes, sinjoro Balabán, ŝteli oni devas scii.“

„Luj homoj estas ege lertaj," diris poste pripenseme sinjoro Malý, „tion ni devas lasi al ili. Mi legis ie pri iu tia kazo, povas esti, ke iu el vi ĝin ne konas. Ĝi okazis ie en Stirio. Tie estis majstro selisto kaj rimenisto, baptonome Antono kaj alnome Huber aŭ Vogt aŭ Meyer, kiel jam kutime nomiĝas germanoj. La selisto ĝuste havis nomtagon kaj sidis ĉe la festa tagmanĝo; sed en Stirio oni ne manĝas bone eĉ en festotago, tio ne estas kiel ĉe ni. Mi aŭdis ja, ke tie oni manĝas eĉ hipokaŝtanojn. La selisto do sidas post la tagmanĝo en la familia rondo, kaj subite iu frapas sur fenestron: jesuomaria, najbaro, brulas ja tegmento super via kapo! La selisto ekkuregis, kaj je mia animo, la tegmenta trabaro en flamoj.

Memkompreneble, la infanoj ekis krii, la edzino plorante elportas horloĝon, mi vidis jam multajn brulegojn kaj mi rimarkis, ke kutime homoj perdas la kapon kaj komencas elporti ion nenecesan, horloĝon, kafmuelilon aŭ kanarion en kaĝo; kaj nur tiam, kiam estas jam malfrue, ili rememoras, ke ili lasis tie avinon, vestaron kaj multajn aliajn objektojn.

„Ĝe jo, pane Balabán, povidas s gustem ten Pištora, vono to nedrží, tyhle falešný zuby; vono se vám ty zuby při vrtání hejbaly, a tak jste si je vyndal a položil na psací stůl; jo, ale tam bylo prachu, – pane Balabán, to byste už taky moh vědět, co v těchhle účtárnách bejvá prachu. To my pak musíme jít za váma, pane Balabán, když tam najdeme takovou tu stopu po zubech; to se na nás ani nezlobte. Ale měl jste ten prach dřív utřít.

Žatracená věč, divil se ten Balabán. Vidíte, Pištore, ono še říká, že jednu chybu udělá i ten nejchytřejší lump, že jo. Jenže vy jste udělal dvě, zubil se pan Pištora. Panečku, my jsme tam jen mrkli, a už jsme hádali na vás, a víte proč? Každý pořádný lupič se na místě s odpuštěním vynto, aby ho nechytli; to už je taková pověra. Jenže vy jste takový nevěrec a rozumář a nedáte na tyhle pověry; vy si myslíte, že na všechno stačí rozum. To máte z toho. Jo, pane Balabán, krást se musí umět.”

„Někteří ti lidé jsou moc šikovní," pravil na to rozvázně pan Malý, „to se jim musí nechat. Já jsem někde četl o jednom takovém případě, možná, že to někdo z vás nezná. To se stalo někde ve Štýrsku. Tam byl mistr sedlář a řemenář, křestním jménem Anton a vlastním jménem Huber nebo Vogt nebo Meyer, jak už se tihle Němci tak obyčejně jmenují. Tedy ten sedlář měl zrovna svátek a seděl u svátečního oběda – ale ono se ve Štýrsku nejí dobře ani ve svátek, to není jako u nás. Já jsem aspoň slyšel, že tam jedí i kaštany. Tedy ten sedlář sedí po obědě v kruhu své rodiny, a najednou mu někdo tluče na okno: Ježíšmarjá, sousede, vždyť vám hoří střecha nad hlavou! Ten sedlář vyletí, a namouduši, krov je v plamenech.

To se ví, děti se dají do křiku, žena s pláčem vynáší hodiny – teda já už jsem viděl hromadu požárů a pozoroval jsem, že obyčejně lidé ztratí hlavu a začnou vynášet něco zbytečného, hodiny nebo kafemlejek nebo kanára v kleci; a teprve když už je pozdě, tak si vzpomenou, že tam nechali babičku a šatstvo a hromadu jiných věcí.

Dume alkuris homoj kaj komencis reciproke sin malhelpi, estingante; poste venis fajrobrigado - vi scias, fajrobrigadano unue devas alvesti sin, antaŭ ol li komencos estingi; sed dume jam komencis bruli la dua konstruaĵo, kaj ĝis la vespero forbrulis dek kvin konstruaĵoj.

Kiu volas vidi grandan incendion, devas iri al vilaĝo aŭ al urbeto; en grandurbo ĝi ne estas tia, tiam vi rigardas pli la bravecon de la fajrobrigadanoj ol la brulegon. Plej bone estas, kiam vi mem povas helpi estingi aŭ eĉ kiam vi povas konsili al la aliaj, kiel ili estingu. Estingi, tio estas bela laboro, kiam ĝi tiel siblas kaj krakas; sed portadi akvon el rivereto, tion oni ne ŝatas. En la homo estas io stranga: se li jam vidas ian katastrofon, li preskaŭ deziras, ke ĝi estu ega. Granda incendio aŭ granda inundo, tio onin iel bonhumorigas; oni sentas, por tiel diri, ke oni ricevis la sian en la vivo. Aŭ ĝi estas ia pagana mirego, mi ne scias.

Memkomprene, tagon poste estis tie kiel - nu kiel post forbrulo: la fajro estas bela afero, sed la bruloko estas terura; estas same kiel pri la amo. Tiam oni nur senpove okulas kaj pensas, ke neniam plu oni rekonsciiĝos el tio. Nu, kaj estis tie juna ĝendarmoj por esplori la kaŭzon de la brulego. Sinjoro ĉefserĝento, diras la selisto Antono, mi vetus, ke tion iu bruligis, kial ĝi ekbrulus ĝuste je mia festotago, kiam mi sidas ĉe la manĝo? Sed neniel mi povas kompreni, kial iu volus venĝi kontraŭ mi, al neniuj ja ion malbonan mi faras, ja des malpli mi zorgas pri politiko. Mi scias pri neniuj, kiu povus havi je mi tian teruran koleregon.

Estis tagmezo kaj la suno ardis; la ĝendarmoj promenadas sur la bruloko kaj pensas, diablo nun ekkonu, kiel ĝi ekbrulis. Sinjoro Antono, subite li diras, kio briletas tie supre sur tiu trabo? - Tie estis tegmenta luko, diris la selisto, eble ĝi estas ia najlo. - Ĝi ne aspektas kiel najlo, diras la ĝendarmoj, pli versimile ĝi estas io kiel speguleto. Ba, kiel povus aperi speguleto tie, diris la selisto, en tiu luko estis ja nur pajlo.

Zatím se seběhli lidé a začali si navzájem překážet s hašením; potom přišli hasiči - to víte, hasič se musí dřív převléknout, než začne hasit; ale zatím už začalo hořet druhé stavení, a do večera jich lehlo popelem patnáct.

Kdo chce vidět pořádný požár, musí jít na vesnici nebo na malé město; ve velkoměstě to už není to, to se díváte spíš na fortele těch hasičů než na ten požár. Nejlepší je, když můžete sami pomáhat hasit, nebo dokonce když můžete radit těm druhým, jak by měli hasit. Hasit, to je krásná práce, jak to tak syčí a praská; ale nosit vodu z potoka, to dělá člověk nerad. Ono je v člověku něco divného: když už vidí nějakou pohromu, tak si skoro přeje, aby byla pořádná. Veliký požár nebo veliká zátopa, to tak člověka jaksi rozjařuje; má pocit, abych tak řekl, že přišel v životě na svůj účet. Nebo to je takový pohanský úžas, já nevím.

Tedy to se ví, den nato tam bylo jako - no, jako po vyhoření; oheň je krásná věc, ale to spáleniště pak je strašné; to máte stejné jako s láskou. To člověk jen tak bezmocně kouká a myslí, že už se z toho nikdy nesebere. No, a byl tam jeden mladý četník, aby vyšetřoval příčinu toho požáru. Pane strážmistr, povídá ten sedlák Anton, já bych se vsadil, že to někdo zapálil; pročpak by to zrovna chytlo na můj svátek, když sedím u oběda? Ale to mně nejde na rozum, proč by se někdo na mně chtěl mstít, vždyť já nikomu nic zlého nedělám, neřkuli abych se staral o politiku. Já teda nevím o nikom, kdo by moh mít na mne takový hrozný vztek.

Bylo poledne a páliło slunce; ten četník chodí po tom spáleništi a myslí si, teď aby čert poznal, jak to chytlo. Pane Anton, povídá najednou, copak se vám to tamhle nahoře blejská na tom trámu? - Tam byl vikýř, řekl ten sedlák, snad to je nějaký hřebík. - Na hřebík to nekouká, povídá ten četník, to je spíš jako zrcátko. Kdepak by se tam vzalo zrcátko, řekl ten sedlák, vždyť tam v tom vikýři byla jenom sláma.

Kaj tamen ĝi estas speguleto, diras la ĝendarmo, kaj mi montros ĝin al vi. Poste li starigis estingistan ŝtupetaron al tiu ĉirkaŭbrulinta trabo, ascendis supren kaj diras: Sciu, sinjoro Antono, ĝi estas nek najlo, nek speguleto, sed ronda vitreto alfiksita al la trabo. Mi petas, por kio ĝi estas? - El tio mi estas perpleksa, diris la selisto, eble infanoj ludis kun tio.

Kaj subite la ĝendarmo, dum li rigardis la vitreton, ekkriegis: Ve! Mil diabloj, ĝi bruldoloras ja! Kio ĝi estas? Kaj li ĉirkaŭpalpis la nazon. Sakre! li ekkriegis la duan fojon, nun ĝi brulvundis mian manon! Sinjoro Antono, rapide donu al mi ian paperon! La selisto donis do al li folieton el sia notlibro kaj la ĝendarmo tenis la paperon sub la vitreto - Jen, li diras post tempeto, sinjoro Antono, ŝajnas al mi, ke ĝi estas solvita Jam li descendas de la ŝtupetaro kaj tenas la paperfolion antaŭ la okuloj de la selisto: ĝi estis brultruita kaj ankoraŭ fumis.

Sinjoro Antono, diris la ĝendarmo, sciu, la vitreto estas konvekso lenso aŭ lupeo; kaj nun mi ŝatus scii, kiu ĝin alfiksis al la trabo, ĝuste super la pajlo-amaso; sed tion mi diras al vi, sinjoro Antono, kiu tion faris, tiu iros de ĉi tie en katenoj.

Pro Kristeto, diris la selisto, ni havis ja nenian lupeon hejme - halt! li subite ekkriis. Atendu, ĉe mi lernadis bubo, Sepp li nomiĝis, kaj tiu senĉese ludis kun tiaj aferoj! Tial mi elĵetis lin, li ne taŭgis por prudenta laboro, ĉar en la kapo li havis nur tiajn stultaĵojn kaj aliajn eksperimentojn! Ĉu estus li, tiu damna bubo - Sed neeble, sinjoro ĉefserĝento. Mi elĵetis lin ja, tio estis komence de februaro; dioscias, kie nun li estas, sed ĉi tie, ekde tiu tempo li ne montris sin.

Tion jam ni ekscios, ĉu ĝi estas lia lenso, diris la ĝendarmo. Sinjoro Antono, telegrafu en la urbon, oni sendu al mi ankoraŭ du ĝendarmojn; la lenson darfas neniun tuŝeti. Unue ni devas trovi la bubon. Memkomprene, vere ili trovis lin; li estis metilernanto ĉe iu ledajisto en tute alia loko; kaj apenaŭ la ĝendarmo enpaŝis la laborejon, la bubo komencis tremi kiel folio.

A je to zrcátko, povídá ten četník, a já vám to ukázu. Pak si postavil hasičský žebřík k tomu ohořelému trámu, vylezl nahoru a povídá: Abyste věděl, pane Anton, není to ani hřebík, ani zrcátko, ale kulaté sklíčko přivrtané k tomu trámu. Prosím vás, k čemu to je? – To jsem blázen, řekl ten sedlář, to si s tím snad hrály děti.

A najednou ten četník, jak tak koukal na to sklíčko, vám zařval: Au! mordyje, vždyť to pálí! Co to je? A ohmatával si nos. – Hergot! zařval podruhé, teď mně to spálilo ruku! Honem, pane Anton, podejte mně nějaký papír! – Tak mu ten sedlář podal lístek ze svého notesu, a ten četník drží ten papír kousek pod tím sklíčkem. – Tak, povídá za chvíli, pane Anton, mně se zdá, že to už máme. – To už leze z toho žebříku dolů a drží ten list papíru tomu sedlářovi před očima: byla v něm propálená dírka a ještě se z ní kouřilo.

Pane Anton, řekl ten četník, abyste věděl, to sklíčko je sběrná čočka neboli lupa; a teď bych rád věděl, kdo ji přivrtal k tomu trámu zrovna nad hromadu slámy; ale to vám říkám, pane Anton, kdo to udělal, ten půjde odtud v železnicích.

Prokristáčka, řekl ten sedlář, my jsme přece žádnou lupu doma neměli – halt! křikl najednou. Počkejte, já měl na učení kluka, Sepp se jmenoval, a ten si pořád hrál s takovými věcmi! Proto jsem ho vyhodil, že nebyl k rozumné práci, protože měl v hlavě samé takové hlouposti a jiné pokusy! Že by to byl ten zatracený kluk – Ale to nejde, pane strážmistr. Vždyť jsem ho vyhodil, to bylo začátkem února; bůhví, kde teď je, ale tady se od té doby neukázal. To už se dozvíme, je-li to jeho čočka, řekl ten četník. Pane Anton, telegrafujte do města, aby sem poslali ještě dva četníky; na tu čočku mně nesmí nikdo ani máknout. Nejdřív musíme najít toho kluka. To se ví, taky ho našli; byl na učení u nějakého brašnáře v docela jiném místě; a sotva ten četník vkročil do dílny, začal se vám ten kluk třást jako list.

Sepp, krias je li la ĝendarmo, kie ci estis la dektrian de junio? Mi petas, ĉi tie, dentklakis la bubo, mi estas ĉi tie ekde la dekkvina de februaro kaj ne foriris eĉ por duontago, pri tio mi havas atestantojn. Estas vero, diris la ledaĵisto, mi mem atestos tion al li, ĉar li loĝas ĉe mi kaj devas varti mian plej etan infanon. Damna afero, diris la ĝendarmo, li ne estas do tiu. Kaj kio estus okazinta kun li? demandis la majstro ledaĵisto. Nu, diras la ĝendarmo, li estis suspektata, ke la dektrian de junio ie en ia diabla loko li bruligis domon de se-listo Antono kaj kun ĝi duonon de la vilaĝo.

La dektrian de junio? diris la ledaĵisto embarasite. Aŭskultu, tio estas stranga; la dektrian de junio la bubo demandis: Kiun daton ni havas hodiaŭ? La dektrian de junio? La festotago de sankta Antono, ĉu? Mi diras al vi, ke hodiaŭ io okazos. Tiumomente bubo Sepp eksaltis kaj volis malaperi post angulo; sed tiam jam ĝendarmo tenis lin je la kolumo. Poste dumvoje la bubo konfesis al la ĝendarmo: ke li koleregis je majstro Antono, ĉar la selisto kapfrapadis lin pro liaj eksperimentoj kiel hundon; ke li volis do venĝi al li kaj tial elkalkulis, kie la dektrian de junio, je la festotago de Antono, precize tagmeze pozicios la suno kaj laŭ tio li ĝustigis la lenson, por ke ĝi bruligu la pajlon, dum li estos dioscias kie, ĉion li preparis jam en februaro kaj poste forlasis la postenon.

Aŭskultu, al tiu lenso poste oni venigis astronomon el Vieno, kaj tiu kapskuis super tio, kiel precize la lenso estis alĝustigita akurate je la sunkulmino de la dektria de junio. Li diris, ke tio estas ĝuste mirakla lerteco, kiam tiu dekkvinjara bubo havis neniajn astronomiajn instrumentojn por angulmezurado.

Kio plu okazis kun tiu Sepp, tion mi ne scias; nur mi opinias, kia astronomo aŭ fizikisto povus esti el tiu stratbubo. Li povis ja esti la dua Newton aŭ iu alia, tiu damna bubo! Sed en la mondo vaniĝas tiom da speciala inĝenio kaj tiom da belaj kapabloj. Sciuj, homoj havas paciencon serĉi en sablo diamantojn aŭ perlojn en la maro;

Sepp, kriĉi na ĉi ten ĉetnik, kdes byl třináctého června? Prosím, tady, drkotal ten kluk, já jsem tady od patnáctého února a neodešel jsem ani na půl dne, já mám na to svědky. To je pravda, řekl ten brašnář, to mu dosvědčím sám, protože bydlí u mne a musí chovat mé nejmenší. Zatrápená věc, řekl ten četník, tak to už nebude on. A co jako s ním mělo být? ptal se ten mistr brašnář. Inu, povídá četník, bylo na něj podezření, že třináctého června tamhle v těch čertech d'áblech zapálil barák sedláře Antona a s ním půl obce.

Třináctého června? řekl ten brašnář zaraženě. Poslouchejte, to je divné; třináctého června se ten kluk ptal: Kolikátého je dnes? Třináctého června? To je svatého Antonína, že? Já vám povídám, že dneska se někde něco stane. V tu chvíli ten kluk Sepp vyskočil a chtěl vzít roha; ale to už ho četník držel za límec. Cestou se pak ten kluk tomu četníkovi přiznal: že měl vztek na mistra Antona, protože ho ten sedlář kvůli těm jeho pokusům pohlavkoval jako psa; že se mu teda chtěl pomstít, a proto si vypočítal, kde bude třináctého června, na svátek mistra Antona, přesně v poledne stát slunce, a že podle toho nařídil tu čočku, aby zapálila tu slámu, zatímco on bude bůhvíkde; to všechno nachystal už v únoru a pak šel ze služby.

Poslouchejte, na tu čočku pak zavolali nějakého hvězdáře z Vídně, a ten nad tím kroutil hlavou, jak byla přesně nařízena právě na sluneční kulminaci třináctého června. Říkal, že to je zrovna zázračná šikovnost, když ten patnáctiletý kluk k tomu neměl žádné ty astronomické nástroje na měření úhlů.

Co s tím Seppem bylo dál, to nevím; ale tak si myslím, jaký by z toho uličníka mohl být hvězdář nebo fyzik. Vždyť to mohl být druhý Newton nebo co, ten zatracený kluk! Ale ono na světě přichází nazmar tolik zvláštního důmyslu a takových těch krásných schopností. Víte, lidé mají tu trpělivost hledat v písku diamanty nebo perly v moři;

sed serĉi en homoj rarajn kaj miraklajn donacojn de Disinjoro, por ke ili ne vaniĝu, tia ideo eĉ ne venas al ili. Kaj tio estas granda eraro."

ale aby hledali v lidech vzácné a podivné dary od pánaboha, aby nepřišly nazmar, to je ani nenapadne. A to je veliká chyba.“